# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speelluinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG 5 N° 6 - OCT. 1985

ATENTINDA ...

VENONTA ESTRARKUNSIDO : SABATO 9-A DE NOVEMBRO
EN ESPERANTODOMO, ANTWERPEN

# P R O T O K O L O

pri la estrara- kaj ĝenerala kunsidoj de sabato 5-a de oktobro 1985 en Antverpeno.

---

## A. ESTRARKUNSIDO

Ĉeestas : Erik D'HONDT (ED), Ivo DURWAEL (ID), Hilde VANINGELGEM-VANDRIESSCHE (HVI) kaj Jan BOVENDEERD (JB)
Prezidas : ID
Protokolas : JB
Komenca horo : 10.15 h.

### 1. Preparo de la ĝenerala kunsido.

1.1. Kotizoj :

La estraro proponos al la ĝenerala kunsido etan adapton al la ekzistanta kotizosistemo kun la celo pli-altigi la membronombron, precipe favore al nia subvencidosiero.
Pro tio ĝi proponos pli allogajn aliĝ-kondiĉojn en jena formo :

- la individua aŭ baza membrokotizo restu senŝanĝa, nome po BF 200,-
- familia kotizo je 3 X la baza kotizo
  jena kotizo estas interesa por familioj kun minimume 4 membroj.
  Kondiĉoj tamen estas: ĝi validas nur por kunloĝantaj familianoj
  ĝi rajtigas je nur unu abono al la FEL-organo
  ĝi kovru ĉiujn membrojn de la familio, el kio sekvas, ke FEL ricevu kompletan liston kun indiko de la aĝo, profesio k.s.
- dumviva membreco je 25 X la baza kotizo.

1.2. Kongresoj :

1.2.1. 1986 - Blankenberge :

La proponitaj datoj (29-30-31/08/1986) ne taŭgas, ĉar la kongresejo ne estos libera. Jes la antaŭa kaj la posta semajnfinoj eblas.
Ni proponos la postan, do je 05-06-07/09/1986.

1.2.2. 1987 - Antwerpen

Ni intertempe sciiĝis ke Nederlando volas ankaŭ organizi kongreson. Ĉu ne pli bone, ke ni aliĝu al la nederlanda kaj prokrastu nian ĝis en 1988.
Plie, Nederlando organizas kongreson ĉiun duan jaron. Ĉu FEL ne faru same alterne kun ili ?
Principe jes.



1.3. Propono de Wim De Smet.

WDS proponis plendi ĉe la Ŝtata Konsilantaro (Raad van State) pri la nova pasporto kiu estos eldonita en la lingvo elektita de la interesito plus la angla.
Temas fakte pri plendo kontraŭ jam Reĝa Dekreto.
Tia plendo estas ebla nur ĝis 07 11 1985 kaj kostos BF 4.000,-. Ĝi povas esti farita nur se ni sukcesos demonstri ke ni spertas malutilon pro tiu decido.
Ne trovante kialon, nek eblon, ni rezignu pri la plendo.

1.4. Katalogo de Esperanto-verkoj en Flandraj bibliotekoj

1.4.1. Kiel anoncite en la antaŭa protokolo, Guido Van Damme kunmetis projekton de katalogo. Tiu ĉi estos metita je la dispono de la grupoj, cele al plikompletigo.

1.4.2. ID ankoraŭ ne kontaktiĝis kun la ministerio pri aĉeto de kvanto da ekzempleroj por disponigo al la Flandraj bibliotekoj.
JB opinias memori ke tiutempe la kontaktojn kun la ministerio estis metitaj de ES. Ĉu ne peti lin denove fari la neceson, ĉar ja li estas plej bone introdukita en tiu medio?

1.5. Manlibro de la Aktivulo :

La unuan serion da paĝoj abonis 100-o da interesitoj. La duan nur 18 ! Kio okazis ?
Ni alvokos al la posttagmeza ĝenerala kunsido.

1.6. Libro-listo

ED pretigis kompletan liston de la libroj en nia stoko. La grupoj povos mendi tiun liston kompletigitan de la prezoj aĉet/vendaj.

1.7. Ekspozicioj

ED kunmetis saketojn da eksterlandaj poŝtmarkoj por esti metitaj kaj venditaj en ekspozicioj kaj/aŭ librobudoj.
Li samtempe alvokas al ŝparo de poŝtmarkoj favore al FEL.

### 2. Diversaĵoj.

2.1. Alvenis propono por Esperanto-traduki kaj eldoni - cetere tre belaspektan libron - "Peace Book" (Pac-libro.
La afero aspektas ne tre simpla kaj verŝajne tre multekosta.
PP esploru la eblecojn.

2.2. "Cultureel Info-Docu-Centrum, Deurne" proponis kulturkalendaron kaj invitis nin publikigi nian kalendaron en ĝi.

Ĉar temas fakte pri loka afero, ID transdonas la inviton al LA VERDA STELO.

2.3. WDS renovigis sian jaman proponon pri feria domo en niaj regionoj. Ĉiuj konsentas por diri ke temas ĉi tie pri persona afero, laŭ la ekzemplo de Kastelo Grésillon aŭ La-Chaud -de-Fonds

2.4. Universitataj tezoj : ES verkis tekston por studentoj kaj universitatoj. Aprobita.

2.5. ESPERANTO PANORAMA
Por eviti ke la grupaj programoj atingu la membrojn tro malfrue, PP proponas strebi al finarangô kaj dissendo ĉirkaŭ la mezo de la eldona monato anstataŭ je la fino.

2.6. S-ro Lentzen el Kettenis sendis al ni specimenon de faldfolio disdonota okaze de la Eŭropa Tago je 03 05 1986. Li petas ke ni trovu du adresojn en Flandrio kie informoj povos esti petataj de interesitoj.
JB respondos al li ke ni en Flandrio uzas nur unu adreson por ĉio kio koncernas Esperanton, nome nian Esperanto-Centron.

2.7. S-ro P.J. van Duijne jam verkis tekston alvokan por trovi kunlaborantoj.

2.8. Propagando :
La kursoj pasintjare alportis netan gajnon de ± 33.000 BF. Tamen, plej multe de la lernintoj ne aliĝas al la movado kaj, do, fakte perdiĝas por ni. Kial ?
Por doni aŭ plifaciligi la eblecojn por esploro kaj propagando, proponiĝas disponigi al la komisiono pri propagando la monon el la kursoj. Principa aprobo.

---

## B. ĜENERALA KUNSIDO

Senkulpigon petis : ESPERANTO 2000, P. Peeraerts, E. Symoens, Wim De Smet, F. Roose, P-ro Beckers, Jan Hanssen

1. La protokolo pri la antaŭa ĝenerala kunsido estas aprobita.
2. Kotizoj : aprobitaj.
3. Kongresoj : aprobitaj
4. Diversaĵoj

4.1. ID proponas libreton pri Esperanto kadre de serio "AO - Van reageerbuis tot Moedertaal". FEL aĉetos kvanton por interesotoj.

4.2. Por fini la prezidanto anoncas la gravan malsanon de samideano Ben Weber el Middelbrug, bone konata de la Antverpenanoj, kaj petas sendi salutkarton subskribitan de la ĉeestantoj.

Fino de la kunsido : 17.10 h.

JB